Ezechiel 23,32: So spricht der Gebieter und Herr: „Den Becher deiner Schwester sollst du trinken, den tiefen und weiten! [Sie soll zum ***Gelächter*** und Hohn werden!] Er fasst gar viel."
Habakuk 1,10: Dies Volk verspottet Könige, und Fürsten sind ihm zum ***Gelächter***. Es ***lacht*** über jede Festung, schüttet Erde auf und nimmt sie ein.
Jeremias 20,7: Du hast mich betört, o Herr, und ich ließ mich betören; du hast mich ergriffen und überwältigt! Zum ***Gelächter*** bin ich den ganzen Tag, jedermann höhnt über mich!
Job 12,4: Zum ***Gelächter*** für seinen Nächsten wird, wer Gott anruft, er solle ihm antworten; zum ***Gelächter*** wird der Gerechte, der schuldlos ist.
Klagelieder 1,7: Jerusalem gedenkt der Tage ihrer Not und Unrast, all ihrer Kostbarkeiten, die sie einstmals besaß, wie ihr Volk in Feindeshand fiel und niemand ihr beistand. Die Feinde sahen sie und ***lachten*** über ihre Zerstörung.
Makkabäer 1: 7,34: Er jedoch verhöhnte sie, ***lachte*** sie aus, beschimpfte sie und führte überhebliche Reden.
Makkabäer 1: 10,70: „Du als einziger empörst dich gegen uns; ich aber bin deinetwegen zum ***Gelächter*** und zum Spott geworden. Warum behauptest du uns gegenüber auf dem Gebirge die Macht?"
Psalmen 2,4: Der im Himmel thront, ***lacht***; der Herr spottet ihrer.
Sirach 13,6: Er schmeichelt dir, weil er dich nötig hat, er ***lächelt*** dir entgegen und bestärkt dein Hoffen.
Sirach 21,20: Der Tor erhebt beim ***Lachen*** seine Stimme, der Kluge aber ***lächelt*** kaum vernehmbar.
Weisheit: 5,4 „Dieser war es, der uns einst zum ***Gelächter*** diente und zu schmähenden Spottreden, uns Toren! Wir hielten sein Leben für Irrsinn, sein Ende für schimpflich."
Lukas neues Testament
6,21: Selig ihr, die ihr jetzt hungert, denn ihr werdet gesättigt werden. Selig ihr, die ihr jetzt weint, denn ihr werdet ***lachen***.
6,25: Wehe euch, die ihr jetzt gesättigt seid, denn ihr werdet hungern. Wehe euch, die ihr jetzt ***lacht***, denn ihr werdet klagen und weinen.

Eingegangen 2002-07-27

Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Horst Völz, Koppenstr. 59, D-10243 Berlin

Rilatoj inter informo kaj humuro (resumo)
En la artikolo oni klopodas pritrakti humuron, komikon, ŝercon kaj diversajn formojn de rido kiel specifan formon de homa komunikado kaj alproprigo de la mondo. Tiucele oni produktis skemajn proced- kaj strukturbildojn, samkiel sistemajn tabelojn. La teksto sciigas pri tiurilataj aspektoj. La pritraktojn kompletigas koncerna kibernetika modelo de emocioj.

grkg / Humankybernetik
Band 43 · Heft 3 (2002)
Akademia Libroservo / IfK

La interlingvistika penso de Janus Di Censo

de Bradio V. MORO III, Poznan (PL)

el la Lingvistika Instituto de Adam Mickiewicz - Universitato

Antaŭparolo

La nuna aŭtoro ekkonis Janus Di Censo en la jaro de la Universala Kongreso de Esperanto en Prago, 1996. Ni estis kune rekte antaŭ tiu kunvenego sekvante alian komunan intereson, la Latinan, en seminario en Brno, kiun organizis la internacia organizaĵo por la antaŭenigo de la vivanta Latina L.V.P.A. Dum tiu seminario Di Censo montris novan libron, kies titolo estis *Trasermo (Trasnacia Sermo)*.

La libro temis pri interlingvistiko. Ĝi pritraktis la lingvan problemon en la mondo, kaj proponis solvon. La solvo, tamen, ne estis precize Esperanto, sed Esperanto-devena lingvo al kiu Di Censo donis la nomon *Trasermo*. La libro mem estis skribita en lingvo, kiun ni povas nomi "Pratrasermo", kiu feliĉe estis tute legebla al Esperanto-konatulo, almenaŭ kun la helpo de la provizitaj notoj. La plej interesa afero en la libro, tamen, ne estis la lingvaĵo, sed la teorio. La analizo de iuj elementoj de la monda lingva problemo, kaj eĉ pli, la pritrakto de la dezirindaj kvalitoj de "transnacia" lingvo, estas laŭ la opinio de la nuna verkanto apenaŭ en iu ajn alia loko pli bone pritraktitaj, kaj kun tiom penetra kaj ampleksa kompreno. Pro tio, ĉi tiu eseo pritraktos la interlingvistikan penson de Di Censo kiel io de ĝenerala scienca valoro.

Enkonduko

Di Censo iom diferenciĝas de aliaj interlingvistoj ne en la identigo de la fundamentaj lingvaj problemoj en la mondo — tiuj de interkomprenigo kaj justeco — sed en la konstato, ke estas alia grava faktoro en la problemaro: la "spirita" naturo de lingvoj, kiu laŭ Di Censo permesas nacian lingvon esti spegulo de la nacia spirito, kaj samtempe malebligas la spiritan neŭtralecon de iu ajn nacia lingvo. Ni ekzamenos aparte ĉi tiun preskaŭ unikan aspekton de lia pensado, kune kun lia aliro al la pli oftaj menciataj aspektoj de la lingvo problemo.

Krome, ni ekzamenos lian solvon. Pri la kriterioj de optimuma interlingvo li multe okupiĝis, kaj lia vizio de la evoluo kaj funkciado de monda interlingvo, "transnacia lingvo", aparte en rilato al malpli altaj niveloj de lingvoj estos ekzaminata iom detale, ĉar ankaŭ tio estas apenaŭ trovebla tiom bone kaj amplekse eksplikata aliloke.

Por Di Censo lingvo funkcias sur tri niveloj:

1. Dialekta
2. (Naci)lingva
3. Internacia

Di Censo emfazis la dialektan nivelon eble ĉar li mem havis distinktan personan sperton pri la Milana dialekto de la Itala. Li aparte alte taksas ĉi tiun dialekton, ĉar ĝi konservis iun elementojn, kiuj devenas de la Latina, kaj liaopinie donas al ĉi tiu dialekto pli da ekspresivo rilate al tiuj elementoj ol havas la norma Itala. Di Censo konsideras la ekziston de dialektoj esti natura kaj ne problemdona fenomeno, kiel ĝenerale samopinius Germanoj kaj Angloj, sed eble ne tiom volonte Francoj. Por Di Censo la dialekto estas la plej intima formo de lingvo, kaj estas unu determinanto de la individua senco de identeco, kiu estas akirita en la plej fruaj kaj formigaj jaroj de la vivo.

Tamen, Di Censo samtempe opinias, ke la nacia nivelo de lingvo estas pli grava. Li kredas, ke ideale la nacia lingvo, kiun li nomis plejparte simple "lingvo" (kontraste kun "dialekto") enkorpigas multajn tipajn elementojn de la diversaj naciaj dialektoj, tiel ke ĝi finfine estas esprimilo de la plej bonaj esprimivaj potencialoj de la tuta dialektaro. Ĝi do por Di Censo reprezentas la lingvan esencon de la nacia karaktero. Ĉu ĉi tio estas ĝusta aŭ ne, ni konsideros poste. Certe por Di Censo, ĝi estas grava punkto, ĉar ĝi estas la modelo cetere de la funkciado de internacia aŭ transnacia lingvo, al kiu la rilato estas analogia al tiu inter dialektoj kaj la koncerna (nacia) lingvo.

Internaciaj lingvoj por Di Censo povas inkluzivi multajn specojn. Evidente iu ajn lingvo, kiun oni uzas "internacie" (multsence) estas internacia lingvo. Tamen la ideala internacia lingvo por Di Censo estas la "transnacia lingvo", kiu estus kaj neŭtrala kaj esprimilo por la optimuma kunebla karakterizaro de ĉiuj subnivelaj (naciaj) lingvoj.[1] La funkciado de transnacia lingvo por Di Censo ne estas, ke oni uzas ĝin por komunikado inter nacioj, sed ke oni uzas ĝin por celoj pli universalaj ol tiuj taŭgaj por aŭ dialekto aŭ (nacia) lingvo. Por li, la plej strikta senco de la vorto aplikata al lingvo necesigas kaj la neŭtralecon kaj la universalan esprimpotencon.

"Internacia lingvo", kontraste, povas inkluzivi lingvojn naciajn, kiujn oni uzas en komunikado inter nacioj aŭ diversnacianoj. Tiaj lingvoj estas ne neŭtralaj, eĉ se ili apartenas al neniu flanko de komunikantaj dialogantoj kiel gepatraj lingvoj, ĉar laŭ Di Censo, ili trudas la proprajn kulturajn trajtojn, valorojn kaj antaŭsupozojn sur ĉiujn uzantojn, vole-nevole. Pli striktsence, tamen, Di Censo preferus diri, ke "vera" internacia lingvo estas planlingvo, eĉ se tiu ankoraŭ ne estas "transnacia" lingvo.

Analizo de la lingva problemo

La analizo de la monda lingva problemo fare de Di Censo similas en la komenco al tiu farita de iu ajn interlingvisto. Plej fundamente, la integriĝado progresiva de la monda socio fare de modernaj komunikiloj, kiun ni nuntempe nomas "tutmondiĝado", necesigas oftan interkomunikadon inter homoj, kies gepatraj lingvoj estas malsamaj. Tiu tendenco nur povas kreski. Samtempe, ni emas konservi kaj uzi niajn multajn naciajn (kaj subnivelajn) lingvojn, ĉar ili estas partoj de niaj fundamentaj personaj kaj etnaj identecoj. Estas evidenta konflikto inter ĉi tiuj du kontraŭaj deziroj.

[1] "Transnacia" ne estas norma Esperanta vorto. Adoptante ĝin kiel neologismo, ni povas difini ĝin signifi ĝenerale "esti internacie sen konsidero de naciaj limoj". Temas, do, ne pri rilatoj inter ŝtatoj, sed pri tiuj homaraj aferoj, al kiuj naciŝtataj landlimoj estas neprikonsiderindaj. Di Censo tamen donas teknikan sencon al la termino konekte kun lingvo.

La praktikaj problemoj estas grandegaj. Tradukado kaj interpretado necesigas grandegajn elspezojn. Unu ekzemplo donita de Di Censo estas la kosto de 25-paĝa raporto en la Angla verkita, kiu bezonas tradukon en la aliajn (tiam) ses lingvojn de la Unuiĝintaj Nacioj. La kosto, li diras, estus 800 labor-horoj, inkluzivante la tradukistojn, tajpistojn kaj kontrolistojn, kaj kostis kiam li skribis la libron ĉ. 20 000 Usonajn dolarojn.[2]

Samtempa tradukado estas granda helpo, sed ege altekosta — kaj ĉiuokaze ne estas havebla ĉiam kaj ĉie por malpli formalaj diskutoj. Parolanto de "malgrava" lingvo ĉiam devas uzi la lingvojn de aliuloj, kaj tio donos al ili komparan avantaĝon. Maljusteco do aldoniĝas al altkosteco.

Gravas, ke la kostoj kaj la maljusteco apartenas ne nur al internaciaj registaraj instancoj, sed al ĉiu internacie funkcianta organizaĵo, ĉu komerca aŭ neporprofita, kaj krome por sciencistoj kaj simplaj vojaĝantoj kaj tiuj, kiuj deziras labori en alia lando.

Por Di Censo, tamen, la pli interesa parto de la problemo estas la spirita aŭ kultura trudado, kiu okazas, kiam oni devas uzi nacian lingvon por internacia komunikado. Ĉar li ŝajne kredas forte je la Sapir-Whorf-Hipotezo, ke la lingvo kiun oni uzas por pensado influas la perceptadon de la mondo, kaj krome ke ĉiu lingvo estas peze ŝarĝita per kultura enhavo - t.e. per valoroj, antaŭsupozoj, pensmanieroj, kategorioj ktp., sekvas ke la nacio, kiu sukcese trudas sian lingvon samtempe trudas sian pensmanieron kaj sian kulturan perspektivon. La kredo, ke tio devas okazi estas la alia flanko de la kredo, ke nacia lingvo vere lingve kunigas la karakterizojn de nacia kulturo.

La solvoj

La solvo estas plej baze tio, kion oni atendus de esperantisto, kiu Di Censo (krom latinisto) estis: necesas havi unu duan lingvon por la uzo de la tuta homaro en interlingvagrupa komunikado. Ĉar estus nenies denaska lingvo (kvankam tio estas dubinda supozo, konsiderande la plibonigitajn ŝancojn por interlingvagrupa geedziĝo), ĉiuj pli-malpli havus egalan ŝancon alproprigi ĝin samnivele por proksimume la sama kvanto de studa laboro kaj lingva talento.

Tamen, de kie venu ĉi tiu universala homara lingvo? Di Censo pri tio havas klarajn ideojn, kaj donas tri proponojn:

1. Oni povus elekti la lingvon de malgranda lando. Evidente nur malgranda homkvanto havus rektan avantaĝon pro tio, kaj la lingvo estus kredeble bone disvolvita kaj normigita, kaj estus sufiĉe granda kvanto da denaskaj parolantoj por bone ĝin ĉie instrui. Tamen, Di Censo trovas problemojn pri ĉi tiu solvo. Eĉ se temus pri malgranda lando, nacia lingvo estas nacia lingvo kun naciaj karakterizoj, kiuj nature ne estus kongruaj kun tiuj de aliaj kulturoj. Krome, eĉ se la nacio estus malgranda, oni povus atendi, ke la eble pli granda kvanto de la parolantoj de rilataj lingvoj havus fortan avantaĝon en la lernado de la elektita lingvo. Germano pli facile lernus la Danan, ekz-e, ol Italo.

[2] La ekzemplo estas iom neaktuala nun pro la antaŭenigo de komputila teknologio unuflanke, kiu malnecesigas repetitan retajpadon, kaj aliflanke eĉ pli timigaj kostoj por ekz-e la Eŭropa Unio kun ties konsiderinde pli multo da lingvoj, kaj kompreneble inflacio.

2. Oni povas elekti klasikan lingvon, kiu tute ne havus denaskajn parolantojn, kaj jam havas konsiderindan internaciecon. Aparte la Latina havas longan tradicion, almenaŭ en Eŭropa kunteksto, de uzado por la spiritaj kaj sciencaj bezonoj de kleruloj de Hispanujo al Finnlando. Tamen, Di Censo konsideras, ke la klasikaj lingvoj havas klasikan esprim-manieron, kiu ne estas kongrua kun la modernaj lingvoj kaj pens-manieroj. Li eble estas iom tro pesimisma tiurilate, forminte la impresojn pri la vivanta Latina antaŭ ol kiam ĝi atingis la nivelon de lerteco, kiun ĝi ĝojas dum la pasintaj dek jaroj. Tamen, oni ne povas nei, ke iuj elementoj estas problemdonaj. Ekzemple, la data sistemo de la Latina estas malfacila. Diri "anno millesimo nonagesimo nonagentesimo sexto" (1996) bezonas 19 silabojn Latine. En Esperanto necesas nur 7 silaboj ("en mil naŭcent naŭdek ses" — ne necesas diri "la jaron"), en la Angla 6 silaboj ("in nineteen ninety-six"). Kaj lingvo kiu ne povas klare esprimi la preskaŭ universalan ideon de "interesa" estas ja iomete maladekvata. Oni ja povus iomete ŝanĝi klasikan lingvon por ke ĝi ne plu havu tiajn problemojn, lasante nur la problemon, ke parolantoj de latinidaj lingvoj (aŭ la nov-Greka, se oni elektus la la klasikan Grekan) povus havi neĝustajn avantaĝojn. Ion similan ja jam faris adeptoj de la "Kolokva Latina Lingvo", kiun Di Censo konis, kaj li alte taksas tion, kaj opinias, ke

> "Probable la estonteco de la vera internacia lingvo ne estas imagebla sen la signo de la latineco, ĉar la inĝenio de la latina sermo plimen penetris ĉiujn civilizaciojn sur la tuta terglobo kaj ankoraŭ influas, ne nur sub la vidpunkto de internaciigitaj vortoj (internomoj), sed ankaŭ sub tiu de lingvaj kalkeoj. Fakte sennombraj konceptoj latine difinitaj estas trafaj tranĉoj en la realaĵo. Hio tamen povos funkcii ĝis la limo cise des kiu la latineco prezentiĝas kiel neforigebla propraĵo de la homa universa inĝenio.[3]

Tamen, finfine li opinias la bazan gramatikon esti tro malfacila, por ke modernuloj povu ĝenerale bone lerni kaj uzi ĝin en la ĉiutaga vivo. Li do aprobas la kultivantojn de la vivanta Latina, ekz-e, sed ne opinias tion esti la plej bona solvo imagebla de la monda lingva problemo.

3. La tria eblo estas krei aŭ adopti planlingvon. Kaj por Di Censo, tio estas la preferinda solvo. Nur planlingvo, li opinias, povas esti tutsence internacia, ĉar eĉ lingvo kiel la Angla aŭ Franca, kiun oni uzas internacie, restas baze nacia lingvo internacie uzata. Li rimarkas, tamen, ke ofte planlingvo baziĝas sur unu lingva familio, kaj estas do tre limigita kompare kun la tuta lingva potencialo de la homaro. Di Censo opinias, ke Esperanto estas la elstara internacia lingvo ĝis nun, sed li deziras ion pli: transnaciecan lingvon. Li eksplikas: "...internacieco estas rolo, fakta afero, dum la transnacieco estas kvalito, scienca problemo."[4]

[3] Di Censo, p. 54
[4] Di Censo, p.82

Kaj denove:

> "Transnacieco signifas sinkreto per ĉerpado de fakultoj el ĉiuj homaj lingvoj, ellaborado laŭ raciaj kategorioj, kaj harmoniiĝo je supera nivelo de lingva esprimpovo."[5]

Kvankam Zamenhof konis dek tri lingvojn, kaj la esperantistaro el multaj landoj kontribuis kaj kontribuas al ĝia disvolviĝo, ĝi ne estas tia lingvo krom potenciale.

Di Censo klare listigas la esencajn kaj kromajn dezirindajn kvalitojn de transnacia lingvo:

1. Universeco de materialoj por la konstruado.
2. Strukturaj principoj transcendantaj tiujn de la naciaj lingvoj.
3. "Karaktero de vera, unueca, elkluziva lingvo."[6]

Li pliprecizigas laŭ la sekvantaj kvalitoj:

1. Racieco (konsekvenceco ktp.)
2. Precizeco (manko de ambigueco)
3. Klareco (de la vidpunkto de facila aŭdebleco de distingoj)
4. Senlima esprim-kapablo (ĉiondirkapableco)
5. "Kreipova kapableco al orginalaj esprimformoj"[7]
6. Neŭtraleco

Kaj li donas aliajn oportunajn kvalitojn:

1. Facileco
2. Fleksibleco
3. Belsoneco
4. Muzik-adapteco (kantebleco)
5. Svelteco (forigo de la peza kaj neutila)
6. "Sento de aparteneco por ĉiuj"[8]

La intenco de Di Censo por la transnacia lingvo optimuma estas, ke la tuta homaro devas ĝin disvolvi kaj evoluigi. Nur Hindoj, ekz-e, povas tute scii, kion la Hinda povas kontribui. Ili do devas esti parto de la entrepreno — kaj simile por ĉiu popolo. Krome la lingvo devos iom post iom evolui, kiel lingvoj ĉiam ĉiuokaze faras. La projekto estas ja por la lingvo de la tuta homaro por ties tuta estonteco, kvankam ĝi neniam ĉesus evolui kaj ŝanĝiĝi.

La transnacia lingvo havus rilaton al la naciaj lingvoj kiel la naciaj lingvoj, laŭ Di Censo, havas al dialektoj. Evidente li havis enmense la historian ekzemplon de la Latina rilate al la naciaj lingvoj en Eŭropo en la Meza Epoko kaj Renesanco. Kvankam pli frue en la vivo la Latina ja mortigis iujn aliajn Italajn lingvojn, en la malpli frua periodo, ĝi ne difektis la lokajn lingvojn, sed interagis kun ili fruktodone ambaŭflanken. Ĉi riĉiĝis de ili kaj riĉigis ilin.

[5] Di Censo, p. 83
[6] Di Censo, p. 106
[7] Di Censo, p. 115
[8] Di Censo, p. 154

Ĉi tiun lingvon Di Censo nomis "Trasermo". Kaj li opinias, ke Esperanto estas la plej bona realisme havebla bazo por tiu lingvo. Li tamen opiniis, ke Esperanto bezonus multajn ŝanĝojn, por fariĝi vera Trasermo. Li eksperimente proponis iujn ŝanĝojn, kaj uzis ilin en la libro. Multaj aldonitaj elementoj estas el la Latina. Aliaj estas el la Germana aŭ aliaj lingvoj. Ni do ĉi tie nomis ĉi tiun lingvaĵon "Pratrasermo".

En la venonta sekcio, ni konsideros la problemojn de liaj teorioj kaj proponoj.

Analizo de la problemoj de Di Censo

La pensado de Di Censo estas multflanke profunda kaj fekunda. Tamen ne eblas ne rimarki diversajn tre bazajn problemojn, kiujn ni pritraktos ĉi tie:

1. La Sapir-Whorf-Hipotezo estas... hipotezo. Kaj kvankam ies lingvo povas rutine influi malgravajn aferojn kiel kolor-percepton, kaj en la plej esceptaj kazoj, kiel pro la verbotempaj principoj de la Hopia lingvo oni povas ja havi signifoplenan diferencon pri bazaj konceptaj en la vivo, la pezo de pruvoj ŝajnas nuntempe montri, ke por la granda plimulto de parolantoj de la grandaj lingvoj de la mondo ne ekzistas grandaj diferencoj en perceptado aŭ pensado kaŭzitaj de lingvodiferencoj.

   Krome, la teorio de kultur-ŝarĝo de lingvoj estas iom dubinda. Oni parolas, ekz-e pri la (laŭ la nuna verkanto ne valida) teorio, ke Ĉinoj ne tiom interesiĝas pri libero kaj homaj rajtoj kiom Eŭropanoj aŭ Usonanoj. La verkanto parolas du ĉinajn lingvojn, kaj scias, ke oni povas facile pensi pri la demandoj kaj argumentoj kaj priparoli ilin kun ĉinoj uzante egale bone ĉinajn lingvojn aŭ aliajn. Konceptoj kaj taŭgaj lingvaj strukturoj simple ne iel ajn mankas. Se ekzistas malsamaj valor-strukturoj en la vivo, ne estas firma kialo diri, ke tio estas pro iu lingva diferenco.

   Tio ne signifas, ke lingvoj ne havas kulturan influon de karaktero, kiun ni povus nomi "ekstera". Afrikano scipovante la Francan povus pli nature uzi francajn materialojn por studado aŭ informiĝo pri diversaj aferoj, ol tiujn en la Germana. Li eble ankaŭ preferus ferii en Francujo ol en Germanujo ktp. Tamen tio ĉio ne vere temas pri la enhavo de la lingvo rilate al kulture kondiĉigaj elementoj. Se lingvoj estas plejparte kulture neŭtralaj de interna vidpunkto, multaj argumentoj de Di Censo ne validas.

2. La analizo de naciaj lingvoj estas misgvida, kiel eĉ li agnoskas, dirante, ke "dialekto" povas ja ankaŭ esti "lingvo". Estas pli ol tri mil lingvoj en la mondo kaj nur ĉ. ducent naciŝtatoj. Evidente, estas normale se unu nacio enhavas multajn - ne nur dialektojn - sed *lingvojn* tute diversajn. La Katalunan lingvon oni povas konsideri dialekto de la Kastilia, se oni dezirus tiel analizi la aferon. Sed la Eŭska, ankaŭ uzata sur la nacia teritorio de Hispanujo, estas eĉ ne Hindo-Eŭropa lingvo. Estas, do dubinde, ke la Kastilia enhavas iujn tipajn lingvajn virtojn de la Eŭska, kiel nacia lingvo laŭ Di Censo devus.

3. Loglano devus esti averto por ĉiuj rilate al la utilo de universeco kaj absoluta neŭtraleco. En tiu planlingvo, oni uzis komputilon, por analizi la son-elementoj por ĉiu leksema ekvivalento en la plej multe parolataj dek-tri lingvoj de la mondo. La rezulto estis, ke la granda plimulto da vortoj ne similas al iu ajn en tiuj lingvoj, kaj ne estis do facile memorebla por iu ajn lernanto. Se "ruĝa" estas en la Mandarena "*hung*", en la Angla "*red*", kaj en la Japana "*akai*", kiel devas aspekti la Loglana vorto, tiel ke ĝi rememorigu la parolantojn de nur tiuj tri lingvoj pri la signifo?

   Esperanto baziĝas sur kelkaj Eŭropaj lingvoj, inter kiuj preskaŭ ĉiuj havas vorton por "ruĝa", kiu komenciĝas per R (*rouge, rot, red, ruber...*). Ĉar ĝi estas limigita kaj ne *tro* universala, ĝi pli bone funkcias. Oni povas dubi, ke iu ajn povas krei lingvon kaj vere universalan pri la krudaj materialoj kaj pro tio pli facilan. Kunmeti lingverojn el la Ĉina, ekz-e, kun elementoj el la Hindaj-Eŭropaj lingvoj estas ege malfacile. Kaj oni povas dubi, ke Tajvananoj opinias Esperanton esti multe pli apartenanta al ili pro la fakto, ke unu ofta vorto en Esperanto ("teo") estas de la Tajvana lingvo ("*tê*").

Di Censo deziras, ke la transnacia lingvo havu la propran unuecan karakteron, sed lia zorgo pri universaleco de krudaj materialoj (vortprovizo kaj gramatikaĵoj) ne ŝajnus konduki facile al tiu celo. Lingvo, kiu provas esti ĉio al ĉiuj, verŝajne rezultiĝos en io kontentiga al neniu.

4. La evoluigo de nova lingvo, kiel Di Censo deziras, estas komplikega afero kun aspektoj kaj sciencaj kaj politikaj kaj praktikaj. Simple adopti la Anglan, la Latinan aŭ Esperanton kiel monda lingvo estus ege pli facile de ĉiu vidpunkto ol provi krei *trasermon*. *Certa* lingvo povas ŝajni esti solvo por lingva problemo. La invito evoluigi novan lingvon tra tempo havas la aspekton de sendifinitiveco kaj ĥaoso. Se ni maltrankviliĝas pri la nuna altekosta, maloportuna kaj maljusta lingva situacio, ĉu ni vere deziras proponi ion tiom malallogan and ŝajne nedefinitan, tiel ke instancoj ne emos agi?

Konkludoj:
La valoro de la penso de Di Censo

En la lasta sekcio necesis montri iujn el la problemoj kun la interlingvistika penso de Di Censo. Tamen, eĉ post tia kritikado, multo de granda valoro restas.

La homaro maturiĝas. Baldaŭ ni regos la genetikan bazon de la homara vivo, por ke ni povu forigi multajn malsanojn kaj malfortojn de la homaro. Baldaŭ la evoluiĝo de mondigita civila socio kaj interŝtataj aranĝoj ordigos multajn aferojn en la internacia homara socio antaŭe senleĝajn. Simile ni baldaŭ devos fari ion kunlaboreme pri la fakto, ke ni parolas per nekongruaj kodoj, ĉar praktike tio estas tre problemkaŭza.

Oni ja povas kredi, ke ĉar ni ne havas bonajn sociopolitikajn mekanismojn por la enkonduko de monda lingvo, eble la mondo simple adoptos la Anglan, kies monda parolantaro estas nun kvarono de la tuta monda loĝantaro. La Angla havas la plej grandan vortprovizon de iu ajn lingvo, kiu iam ajn ekzistis. Ĝi estas fleksebla kaj

akceptema. Multaj aspektoj de ties gramatiko estas tre facilaj. Aliflanke, ĝi havas tre nekonsekvencan ortografion, la prononco estas iom malfacila, ne estas unueco de uzo inter Britoj kaj Usonanoj, kaj ĝi estas – almenaŭ en la opinio de Di Censo, al kiu estetikaj konsideroj tre gravas – malpli bela ol multaj aliaj lingvoj. Kaj ĝi estas tre neneŭtrala, kaj donas grandajn avantaĝojn al la multaj civitanoj de la plej forta lando en la mondo. Krome, ene de Eŭropo al la loĝantoj de unu lando (aŭ du landoj, se ni nombras ankaŭ Irlandon) super la aliaj.

Ĝenerale, de idealisma vidpunkto la deziroj de Di Censo por la homara lingvo estas raciaj kaj bone elpensitaj. Se oni povus venki la praktikajn malfacilaĵojn (pli grandaj ol por Esperanto mem), lia plano estus argueble subteninda.

La zorgado de Di Censo pri tio, kiaj kriterioj karakerizu la optimuman homan lingvon estas kroma grava afero ĉe Di Censo, kaj io, kio estas bone ellaborita. Ĉiu kreonto de nova interlingva projekto devus antaŭe legi Di Censo, ĉar lia detala diskuto pri tio estas valorega. Krei la plej bonan eblan lingvon por la tuta homaro por la tuta estonteco estas ja inda zorgo, kaj Janus di Censo kontribuis al tiu celo.

Ricevite 2002-07-08

Adreso de la aŭtoro: Brady Moore, B.A., Lingvistika Instituto de UAM, ul. Miedzychodska 3-5, PL-60-371 Poznan, bmaurus@amu.edu.pl

Literaturo

Di Censo, Janus. *Trasermo (Trasnacia Sermo)*. Milano: LASER Edizioni, 1994

Interlinguistic Thought of Janus Di Censo (Abstract)

Janus Di Censo was an original theorist in interlinguistics. His work is presented in „Trasermo", in which he first analyses the world language problem, and then discusses various possible solutions in some detail. He finds a planned language to be the most satisfactory approach, and perhaps his most valuable contribution to the field is his careful development of the criteria and desideria to be considered in the construction and guided evolution of such a language. A fully developed interlanguage should not only be neutral, but should be an instrument suitable for the full and opportune expression of the concerns and insights of the multi-cultural global society. Di Censo shows considerable appreciation for such traditional cultural languages as Latin and Sanscrit, while considering Esperanto to be a promising starting point for the collaborative intercultural development of the eventual universal interlanguage.

grkg / Humankybernetik
Band 43 · Heft 3 (2003)
Akademia Libroservo / IfK

Anaphora with Relative Pronouns: an Algorithm for Italian and Esperanto. Part II: the Test for Esperanto[1].

by Carlo MINNAJA, and Laura G. PACCAGNELLA, Padova (I)

1. *Introduction*

As we saw in Part I of this paper (Minnaja and Paccagnella 2002), an algorithm to aid the choice of the antecedent of a relative pronoun was proposed for Italian. It has its foundations in the theory of the „salience factors", at first proposed by Lappin and Leass (Lappin and Leass 1994) for English. But the algorithm has the risk to be very dependent on the language, as different languages use relative pronouns and sentence division differently.

In order to test the algorithm on different languages, we tested it on Esperanto.

2. *The Reasons of a Choice*

Why just Esperanto? In spite of a great number of studies about the structure of Esperanto, the phenomenon of anaphora resolution has not really been dealt with. In addition, both Italian and Esperanto offer a good synthesis of features appearing in several European languages.

Esperanto already has a lifespan of more than one century, and its grammar and syntactic structure have been deeply and widely studied, but statistical data in Esperanto are very poor: they mainly deal with word frequencies, in order to build international learning texts to be used all over the world, with a common lexicon (e.g. Tišljar 1982). An interesting statistical analysis of conversational Esperanto, with grammatical categories, appeared nearly twenty years ago (Sherwood 1982a). Word statistics were also used in experiments to test how Esperanto can facilitate the learning of other languages (e.g. Halloran 1952; Reiersøl and Wood 1987). The largest scale experiment about the learning of foreign languages through Esperanto was done in linguistic orientation teaching, named in Esperanto "Lingvo-Orientiga Instruado" (LOI), conducted by the University of Paderborn, Germany, along with the International Academy of Sciences of San Marino (Barandovská 1993, Frank 1996). The experiment lasted approximately 20 years, having started in 1973, and was carried on in more than a score of elementary schools in nearly fifteen states of Central and Eastern Europe: France, Germany, Italy, Austria, Hungary, Slovenia, Croatia, Romania, Slovakia, Czech Republic and some re-

[1] The work reported here was supported by the Italian Ministry of Education

publics of the Russian Federation. The experiment used word statistics collected for that specific goal. An extensive, although not exhaustive, bibliography on this subject, containing 120 entries, can be found in a study of the Italian Ministry of Education, December 1993 (Selten, Pagano and Minnaja 1997).

As far as pronominal anaphora is concerned, in Esperanto the redundancy of grammar information and ease of use are balanced. There is a specific ending for the plural not only of nouns, but also of adjectives and pronouns; there is an accusative case, used for the object and motion towards, in nouns, pronouns and adjectives (and, for motion, in adverbs too). On the other hand, there are differences neither in the various persons of the verb nor in the genders of pronouns (except, of course, for personal pronouns); last, but not least, there are no irregularities at all, all plurals have the same ending *-j*, all accusatives have the same ending *-n*, and so on. As for every inflexional language, the morphological filter of non-coreference is a powerful tool and solves a lot of cases of anaphora on its own. In spite of the fact that the accusative allows a considerable freedom in sentence construction, Esperanto is a SVO-type language: in a restricted test on 1045 utterances (Gledhill 2000), SVO is 67.5%, while OVS is 24.7% and SOV 4.9%. When it comes to spoken Esperanto, the variation is even less, as around 80% of the sentences are SVO (Sherwood 1982a). Since verb tenses are not inflected with regard to person, the subject is always expressed compulsorily, but in coordinate clauses. Relative pronouns are inflected with plural and accusative; one of them, *kio* (which, what), has no plural and is always neutral, as opposite to *kiu.*

3. *The Test in Esperanto*

3.1 The Corpus

The corpus in Esperanto contains 909,718 words and was built up by extracting articles from the collection of *Esperanto*[2], a monthly of general Esperanto culture, published in The Netherlands; it is the organ of the Universal Esperanto-Association, the biggest association (nearly 15.000 members) of the Esperanto-speaking community. As is well known, anaphora is more frequent in novels and stories than in newspapers: stories have longer sentences than news, with frequent subordinate clauses. The corpus may be assumed to be sufficiently representative: it gathers literary contributions, cultural articles, news from different countries, information about events and people.

Although Esperanto-speakers are not officially registered anywhere, their number can be guessed approximately: accordingly to various parameters, as memberships in associations or books and reviews published. Taking into account the different levels of command and of use, the Esperanto-speakers can be estimated at between 100.000 and 500.000. By now nearly 250 families in the world are registered as using Esperanto as their home language, sometimes the only one, and a review dedicated to these families is published quarterly; slightly less than 2 000 people is a good approximation for today's native Esperanto-speakers; most of them are young or even very young due to new

[2] Courtesy of the Universal Esperanto-Association.

families, but a certain number is over 60, and there are also native speakers who are sons of native speakers or even grandsons of native speakers. Nearly 200 newspapers or reviews appear, and nearly 1 000 books are published every year.

As Esperanto is mostly learned as a second language, and the average Esperanto-speaker is immerged in other language communities, a good question is whether the use of Esperanto is influenced by the native or the ambient language of the speaker. Studies on this subject had a peak of interest in the early eighties: in 1980, a Symposium on Native-Language Influence on Esperanto was held in Urbana, Illinois. It produced studies on speech in Esperanto (e. g. Sherwood 1982b), and one general result was that the pronunciation does have a variation accordingly to the different native languages; but it is no wider than the variation in ethnic languages, due to difference of region or of social classes. There are hundreds of meetings each year where only Esperanto is spoken, and from one to three thousand people assemble annually at the largest one. In written text the author's mother language usually cannot be guessed; nevertheless some characteristic words of Esperanto as used in a Chinese monthly (Cheng 1982) were pointed out. Gledhill (Gledhill 2000) remarked some variations in phonology. On the whole, the language itself can be considered strongly unitary and standard all over the world; of course, it has had its evolution over the decades of its existence.

3.2 Part-of-Speech Tagging in Esperanto

In order to study anaphors, we needed a tagger for Esperanto, something which had never been set up till now. A first proposal for a tagset does exist (Minnaja 1998), following the standards suggested by EAGLES (EAGLES 1996). Other suggestions were taken from a very rich tagset, actually 199 tags, set up for Italian (Monachini and Calzolari 1995). Demonstrative and relative pronouns are similarly used in both languages; on the other hand, Italian frequently develops relative clauses where Esperanto uses participles (the passive present, or the active and passive futures) lacking in Italian.

Esperanto is pre-tagged for lexical parts of speech so the tagger was set up this way. We stored apart in the data base the uninflected definite article *la* (the), all the personal pronouns, including the indefinite *oni* (one) and the reflexive *si* (himself, herself, itself, oneself), all of them with their own accusatives. We stored apart the 45 words of the "correlative table", which sets up with a great regularity the similarities/oppositions existing also in English in some pairs: "that - what", "there - where", "then - when"; but this similarity fails e.g. in the English pair "those - *whose", while the corresponding Esperanto pair is regular: *tiuj - kiuj*. This table consists of five rows with roots, and nine columns with endings. Each root and each ending has a specific meaning; skipping the others, we have now interest to *tiu* (that), adjective and pronoun, *tio* (that thing), pronoun, *kiu* (who, which), adjective and pronoun, *kio* (what, which), pronoun. The ending in *-u* has accusative and plural, the ending in *-o* has accusative, but no plural.

We stored apart all the conjunctions, prepositions, interjections and the adverbs not derived from nouns or adjectives: a few dozen words in all.

The grammatical roles of the remaining words are rigorously determined by their endings: *-o* identifies the (singular) nouns, *-a* the (singular) adjectives, *-e* the derived adverbs, *-j* the plural (for both nouns and adjectives), *-n* the accusative (for both nouns and adjectives, both in the singular and in the plural), *-i* the infinitive, *-as* the present (without inflections for the different persons), *-is* the past, *-os* the future and so on, for every morphological form. So every word is automatically identified by the tagger; e.g. if it ends in *-anto* it is an active present participle, in the noun form, singular, nominative case; if it ends in *-otajn*, it is a passive future participle, in the adjective form, plural, accusative case. There is nearly no tagging ambiguity at all, and the algorithm gives an output: each word has its own tag, and just one. Actually, a slight risk of error remains, because a few roots end like the suffixes of the participles; this phenomenon has an influence around 0.1%, and does not affect the pronouns.

The inflection of the pronouns is a strong tool for the non-coreference filter. In Esperanto the singular relative pronoun is *kiu* (who, which), with its plural *kiuj*, not inflected with regard to gender. If the relative refers to a whole previous clause or to the demonstrative pronoun *tio* (that thing), the pronoun is *kio* (what, which), and it has no plural. Each one of the three has its accusative case, ending in *-n*. These relative pronouns have the same form as the relative adjectives and the interrogative and exclamatory pronouns and adjectives. We applied the following procedure to extract relative pronouns and discard the other ones:

- if no other interrogative particle, as e.g. *ĉu*, is found in the whole sentence, and the sentence has just one relative/interrogative pronoun/adjective, and ends with a question mark, the pronoun/adjective is taken as interrogative, and discarded. E.g.:

(13) *Kiu venas? Kion li volas?*
Who is coming? What does he want?

Kiu (who) and *Kion* (what) have been discarded.

- if no other interrogative particle, as e.g. *ĉu*, is found in the whole sentence, and there is more than one relative/interrogative pronoun/adjective, and the sentence ends with a question mark, the pronoun/adjective in the first place of the clause is considered as interrogative, and discarded. E.g.:

(14) *Kion pensas tiuj kiujn vi pridemandis?*
What do those think whom you asked about?

Kion (what) has been discarded, *kiujn* (whom) has been kept.

- if the relative/interrogative pronoun/adjective follows a verb like *demandi* (to ask), *enketi* (to inquire) and similar meaning, or it follows main clauses as *mi ne scias* (I don't know), *mi ne komprenas* (I don't understand), *ne klaras al mi* (it's not clear to me), or *diru al mi* (tell me), *sciigu min* (let me know) and the like, the pronoun/adjective is taken as interrogative, and discarded. In this respect, we take advantage from the fact that a rather large collection of semantically similar words and of sentences where they can be met is in the Bilingual Knowledge Bank, where one of the languages is Esperanto (Sadler 1989). It was built up during a project of a multi-language computer translation, having a slightly modified Esperanto as an intermediate language. The project was supported by the Dutch firm BSO and the Dutch Government, and ended in the early nineties with a working prototype of a translation system English-French. Unfortunately, the work was stopped at that result. The Bilingual Knowledge Bank remains the best (and still used) by-product of that experiment. It may rightly be considered as a precursor of contemporary supertagging (Bangalore and Joshi 1999).
Consider:

(15) *Mi ne komprenas kion vi diras.*
I don't understand what you say.

kion has been discarded. In order to do that, we had to identify verbs and expressions which can introduce interrogative pronouns, as mentioned before. As the conjugation in Esperanto is absolutely regular, it was sufficient to store the roots. In this work we made use of a concise dictionary of synonyms (Ojalo 1999).

- if the relative/interrogative pronoun/adjective is the last word in the sentence, it is taken as interrogative, and discarded. E.g.:

(16) *Mi rimarkis, ke oni ŝtelis, mi volas trovi kiu.*
I remarked that somebody stole, I want to find who did.

kiu has been discarded.

- if the pronoun/adjective is immeditely followed by a noun, it is taken as an adjective, and discarded. E.g.:

(17) *Mi vidis homon, kiu homo tuj sin kaŝis.*
I saw a man, and that man hid himself at once.

This sentence emphasizes the concept of "man" through a repetition, but it is a fairly bad sentence in Esperanto; anyway *kiu* has been discarded. A sentence in a good style would be: *Mi vidis homon, kaj tiu homo tuj sin kaŝis.* Actually, in this situation also Esperanto, as well as English, uses the demonstrative pronoun *tiu*. Italian would prefer here a relative adjective accompanying the repetition of the noun: *Ho visto un uomo, il quale uomo si è nascosto subito.*

- if the sentence ends with an exclamation mark, the pronoun/adjective in the first place of the clause is considered as exclamatory, and discarded.

(18) *Mi vidis juvelon, kaj kiun juvelon! Tiun de la reĝino.*
I saw a jewel, and what jewel! The queen's.

- if the sentence starts with an interrogative/relative pronoun, and after the first comma a demonstrative comes, then the first word is a relative, and is coreferent with the demonstrative.

(19) *Kio tie evidentas, tion oni devas eltrovi en la rafinitaj formoj de la ceteraj verkoj.*
What is evident there, just that must be found in the polished forms of the other works.

This form is pretty frequent in Esperanto, as it creates particular evidence for the co-reference; the comma in this case is always used, while in the pair *tio kio* it is often skipped.

3.3. The Test

